

Ipl 32(1/00)

Enhavo

1	Recenzoj pri novaj libroj	2
1.1	The Grammar of Esperanto (FEL).....	2
1.2	Multlingveco de la mondo: æu beno aý malbeno ? (LIU Haitao).....	3
1.3	Pri lingvopolitiko.....	6
1.4	La Granda Vortaro Esperanto-Germana (Detlev Blanke).....	6
2	Interlingvistikaj kontribuoj en lingvistikaj libroj	7
2.1	Aktoj de hungara konferenco	7
2.2	En aýstraj lingvistikaj verkoj	8
3	Nova fakrevuo: Esperantologio.....	9
4	Pri Dalgarno, Wilkins kaj Leibniz.....	13
5	Komparo de planlingvoj kun kreolaj lingvoj	14

* * *

Ipl informas pri interlingvistikaj aktivecoj kaj publicaåoj, inkluzive lingvo-politikaj. La redaktoro nur mencias materialojn, kiujn li ricevis en la originalo aý kiel kopion. La bulteno estas bibliografie orientita, tamen ankaý publikigas recenzojn, raportojn kaj aliajn materialojn.

1 Recenzoj pri novaj libroj

1.1 The Grammar of Esperanto

Jen ege grava libro, kiun devus posedi æiu, kiu iom serioze okupiøas pri esperantologio (kaj regas la anglan):

Gledhill, Christopher (1998): The Grammar of Esperanto. A corpus-based description. (Languages of the World, Materials 190). München/Newcastle: LINCOM Europa. ISBN 3-89586-217-7, 110 p.

(La aýtoro laboras æe la Fako de modernaj lingvoj, Universitato St. Andrews, Skotlando)

Enhavo:

0 Historia kaj socia fono.

1 Fonologio.

2 Morfologio.

3 Sintakso.

4 Frazologio.

5 Interlinia transskribo.

Aldonoj: Statistiko pri la tekstaro, Vortlistoj.

Resumo de FEL

Esperanto aparte taýgas kiel lingvistika studobjekto æar øi estas la plej vaste konata artefarita lingvo. Teorie, la lingvon oni kreis kiel facile lerneblan ilon, unue celante internacian komunikadon. Sed la lingvo uziøas depost la komenco plezure inter amatoroj, intelekto kiel literatura forumo kaj politike kiel propagandilo, specife dum la komunista epoko¹. Laý la plej modestaj kalkuloj, 50 000 homoj parolas Esperanton, sufiæe granda nombro kompare kun aliaj minoritataj lingvoj. Sed la rolo de Esperanto kiel dua lingvo kaj ideologia projekto nur antaý nelonge allogis esploradon en la fako de socio-lingvistiko (Stocker 1995) kaj lingvistoj ne jam analizis la lingvon el kritika vidpunkto. Tiu æi libro estas detala priskribo de Esperanto por lingvistoj, kiuj ne konas la gramatikon kaj strukturon de la lingvo. Øi celas montri al ili, ke Esperanto havas komplikajn sistemojn ne nur de etimologio kaj vortfarado, sed ankaý de sintakso kaj frazeologio. Øi ankaý celas esplori la evoluon de la lingvo depost la fondiøo de 1887. La verko sin aparte apogas sur statistika kaj kunteksta analizoj de reprezenta tekstaro bazita sur komputilo laý la lastatempaj metodoj de 'korpus-lingvistiko'. Certaj morfo-sintaksaj elementoj de Esperanto estas aprioraj: raciaj

¹ Tiu simpliga prezento ignoras la grandegan movadan, kulturalan, sciencajn kaj aliajn kontribuojn, kiujn faris landoj de la t. n. „komunisma epoko“ por Esperanto kaj øia lingvo-komunumo.

sistemoj, ne venintaj de specifaj lingvoj. Kontraŭe, la plimulto de ĉiaj leksikaj aspektoj estas aposterioraj kaj devenas rekte de vort-donantaj lingvoj kiel la Latina.

Enciklopediaj priskriboj kutime sin apogas sur la 16 Reguloj de Esperanto, sugestante tro simplige, ke Esperanto havas minimuman gramatikon.

Tamen dum la natura disvolviĝo de la lingvo kelkaj originalaj kreol-similaj aspektoj evoluis preter la origina priskribo de Zamenhof. Ekzemple, la necerteco pri la rolo de tenso (tempo) kaj aspekto en verbaj particoj, la kreskanta uzo de adverboj kaj prepoziciaj adverboj, aŭ la varianta tem-strukturo ene de konstruitaj nominaloj. Tiuj ĉi procezoj evidentigas la naturan evoluon de la lingvo. Tamen, certaj el ili ankaŭ kreis konfliktojn en la movado karakterizitajn de kontraŭaj vidpunktoj pri la ebleco aŭ ne-ebleco direkti disvolviĝon de Esperanto. La demando specife malfacilas, ĉar temas pri entute unika tipo de parol-komunumo. Ĉiuj ĉi faktoroj malfaciligas la taskon klasigi la lingvon laŭ tradiciaj formuloj. Tiu ĉi volumo skizas lingvistikan priskribon de la specifaĵoj de la lingvo disde la morfosintakso al aspektoj de frazeologio (inkl. idiotismojn kaj kolokaĵojn). La priskribo baziĝas sur komputila analizo de aŭtenta esperantista tekstaro (350 000 vortoj). La tekstara analizo malkaŝas lingvajn kutimojn kaj formaĵojn de frazeologio, t.e. fiskitaj esprimoj, kiuj vidigas konforman lingvan riĉecon kaj dinamismon. Tio kontraŭas la ĉiutagan vidpunkton, ke artefaritaj lingvoj ne povas enhavi veran kompleksecon.

(La libro estas havebla i.a. ĉe *Flandra Esperanto-Ligo*, prezo ĉe FEL: 33,30 EUR + afranko.

Mendu rete ĉe [<retbutiko@fel.esperanto.be>](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be) aŭ per TTT: www.esperanto.be/retbutiko

(Laŭ materialo ricevita

de FEL)

1.2 Multlingveco de la mondo: ĉu beno aŭ malbeno ?

Jen recenzo de LIU Haitao pri libro, kiu enhavas multajn interlingvistikajn vidpunktojn kaj ideojn. La tekston la redaktoro koncizigis. Red.

Max Hans-Jürgen Mattusch, Vielsprachigkeit: Fluch oder Segen für die Menschheit? Zu Fragen einer europäischen und globalen Fremdsprachenpolitik. Frankfurt am Main: Peter Lang, 1999. ISBN 3-631-30587-7. 321 p., prezo 89 DEM

Laŭ kompreno de multaj interlingvistoj, plurlingvismo estas parto de interlingvistiko. Laŭ tiu koncepto interlingvistiko enhavas tri ĉefajn subtemarojn: internacia lingva komunikado, planlingvistiko kaj esperantologio. El la tri partoj, internacia lingva komunikado (aŭ plurlingvismo) estas problemfonto por la scienco. Por solvi la

dilemon de plurlingvismo oni i.a. kreas planlingvojn, por anstataŭigi per ili naciajn lingvojn kiel interlingvoj. La unua temo (internacia lingva komunikado) nur malofte estas sisteme pritraktita. Pro tio bonvenas la recenzata verko.

En la unua ĉapitro "Turmbau von Babel und Vielsprachigkeit"(konstruo de la babelaturo kaj multlingveco, p.21-90), la aŭtoro diskutas sekvajn demandojn: Plurlingvismo: ĉu malbeno aŭ beno al la homaro? Serĉado de origina lingvo; komplekso de homa lingvo; evoluĵupoj de lingvo; serĉado de universala lingvo; kiom da lingvoj estas sur la terglobo? Morto, renaskiĝo, kreado kaj ŝanĝiĝo de lingvo; dialekto kaj lingvo, k.t.p. Tiuj ĉapitroj estas necesaj, por kompreni la sekvan enhavon de la libro.

La problemoj de plurlingvismo estas ne nur regionaj, sed tutmondaj.

Pri tio ĉeftemas la dua ĉapitro („Zur weltweiten Sprachenpolitik“, pri la tutmonda lingvopolitiko, p. 91-129), en kiu la aŭtoro esploras la rilaton inter loĝantara eksplodo kaj lingvoproblemo. Li kvante listigas 20 le la plej grandaj lingvoj, ankaŭ antaŭvidas la eblan ŝanĝiĝon de la stato ĉis la jaro 2050! Multlingveco ekzistas en multaj landoj. Kiel ekzemploj, la aŭtoro skize diskutas la lingvoproblemon en Hindio, arabaj landoj, Ĉinio kaj Usono. En la resta parto la aŭtoro multe citas el S.P. Huntington (The Clash of Civilization, 1998) por atentigi pri la intima rilato inter kultur(cirklo) kaj lingvo. Kvankam mi ne tute samopinias kun Huntington, ke la estonta monda konflikto estos konflikto inter civilizoj, tamen la lingvo mem kuŝas en la kerno de la civilizacio (kulturo). Tial, ĉu ni povas diri, ke en la estonteco lingvaj konfliktoj fariĝos pli seriozaj ol en antaŭaj tempoj?!

En la tria ĉapitro („Zieht die Informationsflut eine sprachliche Kommunikationskrise nach sich ?“, ĉu la informondego sekvigos krizon de la komunikado?, p. 131-160) la aŭtoro diskutas la lingvoproblemon en la scienco kaj precipe la staton en Germanio. Konklude la aŭtoro analizas kelkajn proponojn, solvantaj la lingvoproblemon: 1. Lernado de fremdaj lingvoj. 2. Uzo de iu etna lingvo kiel „lingua franca“ (interlingvo) - tia lingvo nun estas precipe angla; 3. Teknika rimedo, perkomputila traduko. 4. Uzo de planlingvo, ekz. de Esperanto, kiel lingua franca. 5. Kombino de 2. kaj 4., t.e. Uzo de planlingvo en ĝeneralaj kampoj, uzo de la angla en scienco.

Sub la titolo "Zur Sprachpolitik: Droht ein neuer Turmbau zu Babel? (pri la lingvopolitiko: ĉu minacas nova konstruo de babelturo ?p. 239-280), en la kvara ĉapitro, la aŭtoro revuas la historion de nacilingvoj, funkciaj kiel interlingvoj. Laŭ li la

historion teksas libereco, potenco kaj lingvo. Tial la nacilingvaj interlingvoj ankaŭ nomatas potenco-lingvoj.

Fakte, la potenco de lingvo ĉiam ege dependas de la potenco de tiu nacio, kiu ĉin uzas kiel gepatran lingvon. Tion konfirmas la pozicioj de la antikvaj lingvoj (la greka kaj latina), same ankaŭ de modernaj lingvoj (la franca, angla kaj rusa). Kompreneble, ne ĉiuj potenco-lingvoj estas mondlingvoj (Weltsprachen). Oni povas taksu, ĉu lingvo estas mondlingvo, laŭ la sekvaj faktoroj: funkcia forto, politika forto, laŭnombra forto, ekonomia forto, forto kiel oficiala lingvo kaj kiel lingvo de scienco.

La aŭtoro ankaŭ diskutas la komunik- kaj lingvoproblemon en Eŭropa Unio. Ĉar en la nuntempo la fremdlingva instruado ankoraŭ estas necesa kaj grava rimedo por solvi la lingvo-komunikajn problemojn, la aŭtoro dediĉas kelkajn paĝojn ankaŭ al tiu temo.

En la kvina ĉapitro („Fachsprachen von Wissenschaft, Technik und Wirtschaft“, faklingvoj de scienco, tekniko kaj ekonomio, p. 239-280), la aŭtoro profunde esploras la faklingvan problemon en scienco, tekniko kaj ekonomio. En tiu ĉi parto ni povas legi pri jenaj temoj:

la rilato inter komuna lingvo kaj faklingvo, leksiko, morfologio kaj sintakso de faklingvo.

La aŭtoro finas sian libron per la sesa ĉapitro "Internationale Plansprachen" (internaciaj planlingvoj, p. 281-308). Komence li ĝenerale traktas la demandojn pri homa interveno en lingva evoluo, poste la naskiĝon kaj evoluon de Esperanto, kaj fine li prezentas postulojn pri strukturo de planlingvo. La leganto trovas bazajn informojn pri planlingvoj, el kiu la plej elstara estas Esperanto.

Kiel dirite, la informa epoko akriĝas la malnovan problemon pri plurlingvismo. Komputilo ĉefrolas en la epoko kiel la etendigilo kaj ampleksigilo de la homa cerbo. Ĉi bedaŭrinde ankaŭ heredigas la problemon al siaj kreantoj. Kiam mi legas neanglajn literojn en mia komputilo kun programoj por prilabori ĉinlingvon, la literoj fariĝas strangaj ĉinaj signoj! Estus interese, se la recenzata libro ankaŭ tuŝus ĉi tiun novan fenomenon, ĉar ĉi reflektas novan aspekton de la antikva problemo en la komputila epoko.

La verko prezentas al ni la klaran bildon pri plurlingvismo. Ĉi estas valora kaj utila al ĉiuj interesatoj pri internacia lingva komunikado. La aŭtoro sume uzas 32 tabelojn, kiuj estas tre utilaj por konigi kaj ordigi la rilatajn informojn kaj datumojn.

En la fino de æiu æapitro troviðas notoj kaj referencoj, kiuj estas cititaj en la æapitroj. Tamen, en la fino de la libro bedaýrinde mankas bibliografio. Ni ankaý ne trovas indeksojn de nomoj kaj nocioj, kiuj estus helpaj iloj por la legantoj.

(Mi dankas la autoron - d-ro. M. Mattusch, kiu al mi donacis la recenzatan libron. Mi ankaý dankas al d-ro Blazio Vaha, kiu poluris mian lingvaðon).

Liu Haitao
Jisuanji Zhan
Qinghai Lü Chang
Xining, Qinghai
CN-810108 China

Email: htliu@yeah.net Retpagho: <http://htliu.yeah.net>

1.3 Pri lingvopolitiko

Blanke, Detlev/ McCoy, Roy/ Buller, Osmo (Red., 1999): Por aktiva lingvopolitiko. Aktoj de la lingvopolitika seminario en la 81-a UK de Esperanto, Prago 1996. Rotterdam: UEA, 71 p. I SBN 92 9017 062 X. 21cm. Prezo: EUR 7,10.

Jen teksto, kiun UEA disvastigis pri la libreto:

Æu ni bezonas lingvopolitikon? Kio fakte estas lingvopolitiko? Æu øi estas necesa nur por UEA, la æefa reprezentanto de la Esperanto-komunumo, aý æu øi devus koncerni la tutan komunumon? Æu por la konceptado kaj plenumado de nia lingvopolitiko eblas lerni el la spertoj de naciaj lingvoj? Pri tiuj temoj diskutis la lingvopolitika seminario de UEA en la Praga UK en 1996. UEA eldonis libroforme øiajn materialojn, por ke ili povu esti bazo por plua lingvopolitika aktivado. Krom la antaýparolo de *Detlev Blanke*, la libreto enhavas ses kontribuaðojn. *Humphrey Tonkin* faras øeneralan enkondukon al la koncepto de lingvoplanado. *Yamasaki Seikô* kaj *Amri Wandel* skribas pri la lingvoplanadaj spertoj en siaj propaj lingvoj, respektive la japana kaj la hebrea.

La tiama prezidanto de la Akademio de Esperanto, *Werner Bormann*, inventaras la aktualajn defiojn al tiu lingva institucio. Kun multaj ekzemploj *Renato Corsetti* esploras la kreoliðon de Esperanto, t.e. la streæitecon inter personaj gustoj kaj oficialaj normoj. Fine, *Detlev Blanke* resumas la seminariajn diskutojn en analiza artikolo pri la taskoj, kiujn nia lingvopolitiko frontas aý devus fronti. Blanke klopodas ankaý difini, kiuj estu la plenumantoj de tiuj taskoj.

1.4 La Granda Vortaro Esperanto – Germana

Krause, Erich-Dieter (1999): Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Hamburg: Helmut Buske Verlag, IVX + 882 p. ISBN 3-87548-193-3

La øis nun supozeble plej granda iam ajn eldonita vortaro Esperanto-nacia lingvo aperis dum junio 1999, do øustatempe antaý la UK en Berlin (Ni anoncis pri øi en lpl 27 [4/98]).

La prestiøa lingvistika eldonejo Helmut Buske Verlag Hamburg aperigis la vortaregon. La 882-paøa, etlitere kaj dense presita vortaro enhavas pli ol 80 000 artikolojn kaj lingvajn esprimojn en Esperanto kun siaj germanaj ekvivalentoj. La vortaro havas dulingvajn antaýparolon, instrukcion pri la uzo de la vortaro, listojn de mallongigoj kaj uzita literaturo. La lingva materialo konsiderinde superas tion de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV).

Mi faris nur tute supraøajn unuajn komparojn kaj rigardis la kvanton de la registritaj vortkunmetaøoj æe Krause kaj en PIV:

	PIV (1970)	Krause (1999)
akvo	34	99
infano	19	37
mano	26	56
labori	46	82
lerni	24	27
tiri	41	43
afabla	4	6
granda	24	43
nova	15	29

Kompreneble tia statistiko ankoraý ne sufiøe indikas pri la registrita materialo. En PIV ni havas multajn apliko-ekzemplojn, kontekstaøojn. Tiuj malplias æe Krause. Krom tio æe la registro de materialoj en unulingva vortaro povas esti aliaj vidpunktoj ol æe registro en Eo-etna. Ankaý la vidpunkto pri tio diferencas, kion necesas enpreni kaj kion ne, æar la scio pri la vortfaraj reguloj sufiøeas. Tamen, ju pli da registritaj praktike elprovitaj vortoj des pli bone.

La Vortaro ne nur registras la æiutagan lingvon, sed ankau prezentas multan faklingvan materialon el plej diversaj sciencaj kampoj. La vortaro sendube estas utiliga ankaý por nekonantoj de la germana lingvo. La aýtoro estas unu el la malmultaj profesie trejnitaj leksikografoj, pri kiuj disponas la esperanta leksikografio. Li estas profesoro pri indonezia lingvo æe la Universitato de Leipzig, membro de

AdE. Li verkis i.a. ampleksan vortaron Germana-Esperanto (pli ol 40 000 artikolvortoj) kaj grandajn vortarojn por la indonezia lingvo.

La nova libro estos havebla kontraŭ æ. 78 markoj (æ. 39 eŭroj) æe UEA. Oni ankaŭ povas rekte mendi æe la eldonejo, kiu liveras en æiujn angulojn de la mondo: Helmut Buske Verlag, Richardstr. 47, DE-22081 Hamburg, tel. +49-40-299958-0, fakso: +49-40-299958-20, retadreso: buskepubl@aol.com

Detlev Blanke

2 Interlingvistikaj kontribuoj en lingvistikaj libroj

2.1 Aktoj de hungara konferenco

En Ipl 25 (2/98), p. 7-8 ni informis pri la VIII-a Hungaria Konferenco pri Aplika Lingvistiko kaj la interlingvistika sekcio, kiu laboris en ties kadro. Intertempe aperis la aktoj. En la volumoj I kaj III troviĝas kontribuoj pri interlingvistikaj temoj.

Volumo I:

Balaskó, Mária/ Kohn, János (1999): A nyelv mint szellemi és gazdasági töke. I. Szombathely: Magyar Alkalmazott Nyelvészek és Nyelvtanárok Egyesülete. 406 p. ISBN 963 9017 75 2 Ö

En la volumo i.a. troviĝas jena kontribuo:

- Blanke, Detlev: Eugen Wüster und sein „Enzyklopädisches Wörterbuch Esperanto-Deutsch“, p. 53 – 58 (pri Wüster kaj lia Enciklopedia Vortaro Esperanto-Gemana)

Volumo III

Balaskó, Mtria/ Kohn, János (1999): A nyelv mint szellemi és gazdasági töke. III. Szombathely: Magyar Alkalmazott Nyelvészek és Nyelvtanárok Egyesülete, 394 p., ISBN 963 9017 75 2 Ö

En la volumo i.a. troviĝas jenaj kontribuoj:

- Blanke, Detlev: Eugen Wüster, la planlingvoj kaj la „naturalisma skolo“, 265-269

- Koutny, Ilona: Az eszperantó hangrendszeré és kiejtési normája a beszéd-szintézis szemszögéből , p. 271 - 276 (pri fonetikaj aspektoj de Esperanto)

- Prytz, Otto: A nyelvi kommunikáció mint problémamegoldás, p. 277 – 282 (lingva komunikado kiel problemsolvado)

- Rátkai, Árpád: A nemzetközi nyelvi mozgalom kezdete és nyelv (tervezet)váltása Magyarországon, p. 283 – 288 (komencoj de la hungara Esperanto-movado)

- Smidéliusz, Kálmánné (Katalin): Az eszperantó nyelv propedeutikai jellegét vizsgáló

nemzetközi kísérletek, p. 289 – 293 (pri Esperanto kiel propedeŭtiko por lerno de aliaj lingvoj)

- Wacha, Balázs: Duagradaj funkcioj. Diverslingve. p. 295 - 300

2.2 En aŭstraj lingvistikaj verkoj

En du gravaj aŭstraj lingvistikaj verkoj troviĝas kontribuoj de konataj interlingvistoj, kiuj samtempe ankaŭ estas konataj lingvistoj.

1. *Ohnheiser, Ingeborg/ Kienpointner, Manfred/ Kalb, Helmut (Red., 1999): Sprachen in Europa. Sprachsituation und Sprachpolitik in europäischen Ländern. (Innsbrucker Beiträge zur Kulturwissenschaft Bd. 30. Innsbruck: Institut für Sprachwissenschaft, ISBN 3-85124-194-0, 516 p.*

(Ege interesa kaj bonege eldonita libro kun ĉapitroj pri lingvoj en kaj ĉirkaŭ Aŭstrio, lingvoj kaj dialektoj en la tirola regiono, pri malpli konataj lingvoj kiel la baltaj, la jida, ciganaj, keltaj kaj skandinaviaj lingvoj, pri lingvo-kontaktoj, -konfliktoj, -leĝoj kaj – politiko, pri la rusa kaj angla nuntempe en Eŭropo, pri tradukado kaj interpretado, faklingvoj k.a.)

Por interlingvistoj aparte interesa estas:

- Ölberg, Hermann M. : Plansprachen – Interlinguistik – Esperanto, p. 377 – 391

2. *Ernst, Peter (Eld., 1999): Einführung in die synchrone Sprachwissenschaft. Wien: edition Praesens, ISBN 3-7069-0100-5 .*

Øi ankaŭ enhavas jenan ĉapitron:

- Back, Otto: Interlinguistik. Die Lehre von den erfundenen Hilfssprachen, p. 18-1 øis 18-19

3 Nova fakrevuo: Esperantologio

En Ipl n-ro 27 (4/98) ni informis pri la plano aperi fakrevuon pri esperantologio. La unua kajero intertempe aperis. Ĉar estas interesaj ne nur la enhavo sed ankaŭ la redaktaj principoj kaj la redakta komitato, ni reproduktas kvar paĝojn kaj alvokas al abonado.

S. 9-12 klipoj

4 Pri Dalgarno, Wilkins kaj Leibniz

Maat, Jaab (Jacob) 1999: Philosophical languages in the seventeenth century: Dalgarno, Wilkins, Leibniz. (Doktoriga disertacio, prezentita 1999 al la universitato de Amsterdam). ILLC Dissertation Series 1999-03. Amsterdam: Universiteit, Institute for Logic, Language and Computation, ISBN 90-5776-026-6, 341 p. (Informoj æe illc@wins.uva.nl)

4 Komparo de planlingvoj kun kreolaj lingvoj

Heil, Anett (1999): Grammatische Reduktion in Frankokreolsprachen und Plansprachen. (Rostocker Romanistische Arbeiten, Band 2). Frankfurt/Main et al.: Peter Lang, 220 p., ISBN 3-631-34692-1

(Temas pri doktora disertacio, kiu komparas planlingvojn kun kreolaj lingvoj, defendita en 1999 ĉe la universitato de Rostock, Instituto pri Romanistiko.)

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) æe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Red.: Detlev Blanke,
Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin,tel.:++ 49-30-54 12 633, fakso:++ 49-30-54 56 742.

< blanke.gil@snafu.de > Mendojn oni direktu nur al UEA, kontribuojn nur al la redaktoro, se eble per la retpoŝto aŭ diskede. Artikoloj sen indiko pri aŭtoreco estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Estas bibliografiitaj nur posedataj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.
